

lingvonimio grupon de turkaj lingvoj pasintece oni nomis "tureckije jazyki", poste - "turecko-tatarskije jazyki" kaj nuntempe - "tjurkskije jazyki". Pasintece la lingvojn de Afriko sude de Saharo oni nomis "negrskije jazyki". Sed posta studado kaj esplorado de afrikaj lingvoj rezultigis en la fakto, ke afrikanistoj apartigis el "negraj lingvoj" diversajn lingvogrupojn - "jazyki bantu", "kuŝit-skije jazyki" k. a.

Konkludante, ni devas substreki, ke ennia artikolo estis tuŝitaj nur kelkaj problemoj de la lingvonimiko. Nia opinio, estas tre grave el la teoria kaj el la praktika vidpunktoj detale analizi lingvonimian materialon ekz. en unu apartalingvo, aŭ observi realigon de unu lingvonimo en diversaj lingvoj de la mondo. La novapartigita aspekto de onomastiko - la lingvonimiko - havas ankaŭ praktikajn problemojn, rilatantajn al la ĝustigado kaj al la unifikado de lingvonimoj sur bazo de la internacieco kaj de ligoj kun lingvo-origino.

Bibliografio

1. Drezén E. Historio de la mondlingvo, Oosaka, Pirato, 1967.
2. Meillet A. et Cohen M. Les langues du monde. Nouvelle édition. T. I-II, Paris, 1952.
3. Weinreich U. Language in Contact, The Hague, Mouton & Co, 1967.
4. Simeon R. Enciklopedijski rječnik lingvističkih naziva /na 8 jezika: hrvatsko-srpski, latinski, ruski, njemački, engleski, francuski, talijanski, ŝpanjolski/. T. I-II, Zagreb, Matica Hrvatska, 1969.
5. Africana I. /Trudy gruppy afrikanskih jazykov/, Moskva-Leningrad, Izd. AN SSSR, 1937.
6. Narody Afriki. /Narody mira. Etnografičeskie očerki/, Moskva, Izd. AN SSSR, 1954.
7. Narody Zarubežnoj Evropy. T. I, Moskva, Izd. AN SSSR, 1964; T. II, Moskva, Nauka, 1965.
8. Narody Srednej Azii i Kazahstana. T. I, Moskva, Izd. AN SSSR, 1962; T. II, Moskva, AN SSSR, 1963.
9. Jazyki narodov SSSR. Moskva, Nauka. T. I /Indoevropskije jazyki/, 1966. T. II /Tjurkskije jazyki/, 1966. T. III /Finnougorskije jazyki/, 1966. T. IV /Kavkaskije jazyki/, 1967. T. V /Mongol'skije jazyki, tunguso-mančĝurskije jazyki/, 1968.
10. Juŝmanov N. V. Opredelitel' jazykov, Moskva-Leningrad, 1941.
11. Giljarevskij R. S., Grivnin V. S. Opredelitel' jazykov mira po pis'mennostjam, izd. 3. Moskva, Nauka, 1965.
12. Andreev M. S. Po etnologii Afganistana, Taŝkent, 1927.
13. Deŝeriev Ju. D., Protčenko I. F. Razvitije jazykov narodov SSSR v sovetskiju epohu, Moskva, Prosvetŝeniije, 1968.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973.
--	---

SEMANTIKO

/ V. Zlotnikova, PARIZO, Francio /

La vorto "semantiko", devenanta el la greka "semantikos", kio signifas "signifas", kovras per si du nociojn: 1/ laŭsignifa aspekto de aparta vorto kaj 2/ scienco pri vortsignifo, alie nomata ankaŭ semasiologio /-scienco pri signifo, senco/. Kiel scienco la semantiko formiĝis fine de la lasta jarcento. Ĝi estis konsiderata kiel branĉo de lingvoscienco okupiĝanta pri la signifoj de la vortoj kaj pri ilia historia evoluo.

Proksimume samtempe, en la sino de la logiko, naskiĝadis alia aparta scienco, iom poste ricevinta nomon semiotiko - scienco pri signoj. La impeta progreso de la scienco en nia epoko kondukas al tio, ke ekestas novaj specoj de sciencoj, la malnovaj reciproke sin interpenetras, tute aliformigante apartajn branĉojn de iu scienco. Tio okazis ankaŭ al la semantiko. La brila progreso de la matematikaj sciencoj kaj la penetra de matematiko en sciencojn, kiuj iam estis konsiderataj nematematikeblaj, kaŭzis modifon en pluraj tradiciaj humanitaraj sciencoj. Nun oni ne hezitas apliki en tiaj sciencoj metodojn de sciencoj naturaj. Ekzemple, la principo de kromeco de Bohr estas aplikebla ankaŭ en la lingvistiko.

La semiotiko - scienco pri signoj kaj ties sistemoj - fortiĝis sur bazo de la matematika logiko kaj ĉiam pli vastigis sian kampon de esplorado. La unuajn provojn konsideri la lingvon kiel sistemon de signoj ni trovas ĉe filozofoj.

Tian interpretadon de lingvo ni trovas jam ĉe Hobbes, Locke kaj Leibniz. Kun fortiĝo de la semiotiko kiel scienco oni komencis pli insiste esplori la lingvon kiel sistemon de signoj, unue filozofoj por evoluigo de Aristotela logiko per konstruado de artefaritaj formaligitaj lingvoj, kaj poste ankaŭ lingvistoj kun lingvistikaj taskoj. Tiel la semantiko iĝis parto de pli ĝenerala scienca sfero - semiotiko. Nature, la semantiko mem ankaŭ plivastigis sian sferon: nun oni parolas pri semantiko ne nur de vortoj de iu lingvo, sed pri semantiko de signoj ĝenerale. Do nun oni devas distingi du semantikojn: ĝenerala semantiko - pri signifoj de signoj, kaj pli speciala - lingvistika - semantiko - pri signifoj de vortoj.

Nin kompreneble antaŭ ĉio interesas la lingvistika semantiko. Tamen oni ne povas ĝuste orientiĝi en pli speciala scienco neglektante la propoziciojn de la pli ĝenerala. Tio estas aparte grava por la scienco pri la lingvo, kiu estas tre komplika socia fenomeno evoluanta ne per si mem - kvankam oni parolas pri lingvistikaj leĝoj, - sed depende de la evoluo de ĝia portanto - la homa socio.

Lingvo estas nepra kondiĉo por la funkciado de socio. Evoluo de socio, de homa agado tuj reflektiĝas en signifoj de vortoj, kiuj servas por fiksi certajn homajn atingojn. /Tio estas unu el iliaj funkcioj./ Ekzemple, ĝis la apero de la telefono ne ekzistis la vorto "telefono", ĝis la eltrovo de la elektro ne ekzistis la vorto "elektro" en ĝia nuna senco /la grekdevena vorto "elektro" origine signifis "sukceno", ĉe kiu oni unue malkovris la elektrajn fenomenojn/, ĝis la formiĝo de kapitalismo ne povis aperi la vorto "kapitalismo"... Ĉi tie tuj ekestas la demando: tamen la vorto "socialismo" aperis ja antaŭ ol sur la tero estiĝis la socia reĝimo ricevinta la nomon "socialismo"...

La nocioj de prisociaj sciencoj estas la plej diskutataj kaj diskutindaj. Tio estas tute natura: ili ofte tuŝas personajn interesojn de homoj, kaj de ties interpretado ofte dependas la morala rajto por ekzistado de tiu aŭ alia socia instituto. Ni enrigardu nure la P.V. de E. Grosjean-Maupin, eldonitan de SAT, kies politika tendenco estas bone konata. En ĝi ni trovas la difinojn de la vorto "bolŝeviko"... Komento estus superflua.

Politika nuanco en difino de sociscienca termino estas neevitebla. Tial, traktante semantikon de iu vorto, la lingvistika semantiko ne povas neglekti tiun faktan, kaj por resti sur strikte scienca bazo, ĝi devas atenti plurajn eksterlingvajn fenomenojn.

Por klarigi la aperon de tia vorto kia "socialismo", ni por momento forlasu la terenon de la sociaj sciencoj kaj turnu nin al tiu de la naturscienco.

En la flemio Mendeleev priskribis ecojn de elementoj tiam ankoraŭ neniam renkontitaj de homoj. Le Verrier antaŭdiris ekziston kaj elkalkulis la situon de la planedo Neptuno. Pri kio diras tiuj ĉi faktoj kaj al ili similaj? - Evoluo de la scienco estas serĉado de leĝoj regantaj en la sfero de tiu aŭ alia scienco. Aplikante la eltrovitajn leĝojn kaj leĝkonformojn al la konataj al li naturaj /sociaj/ faktoj, sciencisto kapablas antaŭdiri /elkalkuli/ aperon aŭ eltrovon de tiaj fenomenoj, kiuj ankoraŭ ne estas eltrovitaj aŭ inventitaj. Tiuj anoncigitaj eltrovoj ankaŭ estas fiksataj per apartaj vortoj. /Similan nomigon, bazitan sur imagopovo de homo, ricevis - je pli malalta nivelo de homevoluo - tiaj fantaziaj estaĵoj, kiaj "koboldo", "nimfo", "diablo", ktp./

Do, kio koncernas la problemon de vortapero, ni vidas ties du manierojn: tiu de postpraktika nomigo /"telefono"/ kaj tiu de teoriumada nomigo /kien ni povas inkluzivi ankaŭ la vorton "socialismo". Rememoru la utopiistojn!.

Post naskiĝo de vorto komenciĝas propre ĝia vivo, ĝia evoluo. Signifo de vorto neniam restas senŝanĝa. Ĝi evoluas kune kun la evoluo de la homo, kun la evoluo de la homa socio, de la scienco. Bonkonata estas la evoluo de la vorto "atomo". Ekestinte en la antikva greka filozofio kiel signo pri la nocio pri la plej malgranda, simpla kaj nedividebla parto de la materio konsistiganta la universon /"atomo" traduke el la greka signifas "nedividebla"/, nun tiu vorto tute ŝanĝis sian enhavon: la komplika strukturo de atomo nun estas konata al ĉiu lerneĵano. Kompleksaj procezoj de la atoma mondo naskis eĉ apartan sciencon - kvantan mekanikon.

Simile evoluas ĉiuj vortoj de la lingvo, kaj ne nur depende de la sciencteknika progreso de la homaro. Ekzistas pluraj faktoroj, kontribuantaj al la evoluo de la vortsignifoj. Kiel ekzemplon ni ekspliku unu el ili.

La lingvon uzas homoj. La homoj havas psikon. La psiko obeas la leĝojn de la psikologio. Kaj la leĝoj de la psikologio influas ankaŭ la vivon de la vortoj /tra la psikon de la homo/.

Ekzistas tia psikofiziologia nocio kia "limo de percepto". Ĝi ekzistas por ĉiu homa sentorgano: okulo, orelo, flarorgano ktp. en fiziologia plano: ekzemple, por orelo ekzistas la limo por percepto far de la homo de la plej altaj kaj la plej malaltaj sonoj. Ekzistas tia limo ankaŭ en psika perspektivo. Nome:

La homoj interkomunikiĝas per vortoj. Ili perceptas diratajn aŭ skribitajn vortojn. Sed kiel psika fenomeno aperas limo en perceptado de vortsignifo depende de la intenseco de la vortuzado. Tiel, se vorto estus perceptita de homo la unuan fojon kaj havas por li interesvekantan signifon, la homo adekvate reagas al tiu vorto. Tamen se post tiu unua renkontiĝo kun la vorto la homo neniam plu ĝin renkontos/ankaŭ en la interna parolo/, la vorto - sub la lavango de alia pli vivsignifa informado ade ricevata de la homo - forviŝiĝas el lia konscio. Male: se la vorto estas uzata tro ofte, ĝi perdas la freŝon por la percepto kaj finfine efikas al la homo ne pli ol tiktako de horloĝo, kiun ni - sen streĉo de atento por ĝi - tute ne rimarkas. Tiun fenomenon ofte ne atentigas malbonaj edukistoj kaj propagandistoj, tiamaniere malŝparante al vento tedajn edifvortojn aŭ profanante tre noblajn ideojn per ties troa kaj senbezona ripetado.

Tiu ĉi psika fenomeno - limo de percepto - kreis en la lingvo apartan manieron de vortuzado, nome la figuran. Unue aperinta figura senco de vorto impresas en la menso de aŭskultanto/aŭ leganto/ klaran vivan bildon. Daŭra uzado de la senco senigas la vorton de tiu imprespovo, kaj la senco iĝas komuna. Ekzemple la nuna komuna itala vorto "testa" signifas "kapo", dum origine ĝi signifas "poton". Esploru en via lingvo: ĉu oni ŝerce ne nomas foje kapon "poto" aŭ simile?!

Tre ofte pro ŝanĝo de signatoj vorto ilin signanta ne plu respondas laŭ sia origina signifo al la enhavo de la signato/rememoru la vorton "atomo" origine - "nedividebla"/. Sed se temas pri socia fenomeno, tia situacio havas jam nemalgravan socian efikon. Ja estas konate, ke nova socia fenomeno aperas pro historia neceso kaj - se ni agnoskas la progresivan evoluon de la socio - havas progresivan signifon. Same la vorto ĝin signanta. Ĉiu fenomeno evoluas kaj pro socia progreso necese devas cedi lokon al alia socia fenomeno pli progresiva: alie ĉesus la evoluo de la socio! Do en la fino de sia evoluo la enhavo de iu socia fenomeno ne estas jam progresiva, sed male, ĝi rolas kiel malprogreso rilate al nova pli progresiva socia fenomeno. Sed la vorto, nomo ĝin signanta, restas la sama. Por defendantoj de la malnova fenomeno ĝi signifas tute alian ol por batalantoj por la nova, pli progresiva fenomeno.

Ĝuste tiu ĉi komplikeco en reflektado de sociaj faktoj far de lingvo altiris la atenton de pluraj lingvoesploristoj, sociologoj, filozofoj. Formiĝis eĉ aparta

tendenco en la filozofio, ricevinta la nomon "semantika filozofio", kaj kiel unu el ties direktoj la t.n. "ĝenerala semantiko" / ne konfuzu kun la supre difinita ĝenerala semantiko por la scienco pri signifoj de signoj ĝenerale/. Laŭ la opinio de la reprezentantoj de la filozofia "ĝenerala semantiko" la plimulto de sociaj, interhomaj, sciencaj konfliktoj kaj miskomprenoj okazas pro malperfekteco de lingvo, pro "tiranio de vortoj". Anstataŭ solvi problemojn de la socia vivo, la "semantikistoj" proponas perfektigi la lingvon, eligi el ĝi vortojn kaj esprimojn "semantike miskondukantaj" /G.Ryle/, tiajn kiaj estas "kapitalismo", "agreso", "faŝismo", "klasa batalo", kiun lastan ekz. Chase opinias malkongrua kun la homa moralo, k.a. La "semantikistoj" vidas en la "ĝenerala semantiko" universalan rimedon por kuraci ĉiujn sociajn malsanojn, por solvi ĉiujn sociajn problemojn. Por ilustriti tion sufiĉas nur listigi kelkajn titolojn de iliaj verkoj: "Semantiko en la internaciaj rilatoj" de Lundberg, "La lingvo de la politika teorio" de Margaret Macdonald, "Ĝenerala semantiko en la ĉiutaga vivo" de Lowven, k.a.

Oni povas dubi, ke solvon de internaciaj konfliktoj kaj de kvereloj de la ĉiutaga vivo oni povas trovi en la semantiko. Tamen estas ekster ĉia dubo, ke ĉe la nuna evoluo de la tekniko al la semantiko kiel semiotika scienco - inkluzive la lingvistikan sciencon pri vortsignifoj, apartenas grava rolo. La homa industria agado ĉiam pli vastiĝas, kaj la homo ĉiam pli liberigas sin de fizika laboro por dediĉi sin pli komplete al solvo de gravaj intelektaj problemoj. Li kreas ankaŭ tiajn maŝinojn - cibernetikajn, kiuj plifaciligas lian intelektan laboron. Kaj ĝuste en la sfero de kreado de cibernetikaj mekanismoj la semantiko kune kun aliaj sciencoj kiaj la logiko, la psikologio, la bioniko k.a. donas nesuperaksekablajn rezultojn. Mekanikigo de pensa procezo /per cibernetikaj mekanismoj/ postulas ordigon kaj klasigon de ĉiuj nocioj kaj sencoj, detalan analizon de ĉiuj vortsignifoj uzataj de homo. Pri tiu ĉi aspekto de lingvoscienco okupiĝas nun t.n. aplikada lingvistiko. Tiu ĉi scienca analizo, ordigo kaj precizigo de la lingvo sendube influos siavice la pluan evoluon de la homa intelekto, portante ĝin al tiaj kulminoj, kiujn ni nun eĉ ne povas imagi. Kaj grava rolo en tiu evoluiĝo apartenas al la lingvistika semantiko. En lumo de tiuj ĉi perspektivoj reliefigas la nunaj problemoj kaj taskoj de la scienco.

Laŭ nia opinio, la plej grava por la plus evoluo de la lingvistika semantiko problemoj estas tiu pri elekto de kriterioj por solvo de la semantikaj problemoj. Pro la specifa karaktero de la lingvo, kies evoluo - kiel ni montris supre per kelkaj ekzemploj - okazas ne el si mem, sed depende de evoluo de ĝia portanto, oni ne povas paroli pri pure lingvistikaj kriterioj por solvo de semantikaj problemoj, kvankam inter lingvistoj aŭdiĝas plendaj voĉoj ĝuste pri manko por la lingvistika semantiko de pure lingvistikaj kriterioj. Kaj dume la lingvistoj serĉas la lingvistikan ŝtonon de semantiko /ekz. V. Zvegincev/, la tradicia semantika esplorado apogas sin sur kriteriojn logikajn, psikologiajn, kulturhistoriajn, sociologiajn k. a.

Inter la solvotaj problemoj estas troveblaj:

- 1/ naturo de la leksika signifo;
- 2/ konstato de la senca strukturo de la vortoj kaj esplorado pri interrilatoj de apartaj elementoj de tiu ĉi strukturo;
- 3/ ekzameno pri tipoj de leksikaj signifoj kaj leĝkonformo en la senca evoluo de la vortoj, kio estas grava por la etimologio;
- 4/ sinonimio, antonimio, omonimio, polisemio, kiu lasta servas kiel bazo por leksikografiaj esploroj;
- 5/ analizo pri tipoj de signifŝanĝoj kaj stabiligo de principoj por ilia klasifikado, k. a.

Kiel ekzemplon de la supre menciita klasifikado oni povas prezenti la klasifikadon de H. Paul, kiu estas la plej tipa. H. Paul klasifikas la tipojn de signifŝanĝoj en tri ĉefajn grupojn:

- 1/ vastigo de signifo;
- 2/ malvastigo de signifo;
- 3/ variaj tipoj de signifdevioj / surbaze de asociacioj laŭ similo, laŭ kontrasto, laŭ apudeco, laŭ funkcio k. c. /.

Foje la ceterajn oni apartigas en memstaran grupon, en kiu eniras "boniĝoj" kaj "malboniĝoj" de signifoj, litotoj, hiperboloj ktp.

Tamen kiom ajn grava estu la esplorado pri signifŝanĝoj, laŭ nia opinio, pli grava tasko por la modernaj bezonoj estas tiu, proponita de F. R. Blake, kiu interalie skribas: "Ĉis nun la semantiko okupas sin per esplorado pri signifŝanĝoj de vortoj sur apartaj etapoj de ilia ekzistado - ĝi estas laŭesence historia

semantiko. Necesas krei statikan semantikon, kiu analizus kaj ordigus en sistemon signifojn ekzistantajn en ĉiuj tempoj en la menso de la "konsumantoj" de lingvo kaj studus la plurajn signifojn sen ilia rilato al formo kaj evoluo."^{1/} Ĉi estas problemoj de la ĝenerala semantiko. Tamen F. R. Blake komprenas, ke ĝia solvo estas ankoraŭ absolute nepreparita: "... ni ne disponas pri la tuta sumo de eblaj signifoj - unue oni devas ilin eltrovi, registri kaj sistemigi - tial oni ne povas fari per dedukta vojo la logikan semantikan analizon. Tiamaniere, komence la sistemo devas esti ne logika, sed lingvistika, bazita ne sur abstrakta logiko, sed sur la veraj faktoj de lingvo."^{1/}

Do, ne ellasante en perspektivo la taskon proponitan de F. R. Blake, ni devas koncentrigi nian atenton je esplorado de la lingvo, je semasiologiaj esploroj. Ekzistas diversaj tendencoj en tiuj esploroj. Ni povas menci la historian tendencojn de F. Seiler kaj de Greenough kaj Kitteridge, la teleologian de O. Jespersen, G. von Gabelenz kaj Michaelis, la etikan de K. Jaberger, L. Tobler kaj Trench, la voluntarismo-psikologian de W. Wundt, la genetiko-empirian de E. Wellander, la pankronikan, la strukturalisman k. a. Kiel evidentas, ĉiuj ĉi tendencoj ricevas sian nomon de direkto elektita de esploristo por sia esplorado. Oni ne povas sentenci, ke iu el la tendencoj estas la plej ĝusta kaj fruktodona kaj iu alia senfrukta. En scienca esplorado de objekto gravas ĉiuj direktoj kaj aspektoj de esplorado. Ĉiu el ili donas sian eron al ĉiam pli perfekta ekkonado de la objekto. Tio ĉi validas ankaŭ por la semasiologiaj esploroj de lingvo.

La uzatajn metodojn de esplorado oni povas dividi je du ĉefajn klasojn: de skripta /priskriba/ kaj genetika.

En la lasta tempo en la sino de la deskripta metodo oni proponis analitikan ekzamenon de la vortsignifo tra monosemo /V. Zvegincev/, difinita kiel semantiko-sintaksa formaĵo.

III

Transirante al la objekto de semasiologiaj esploroj - la signifo - oni devas antaŭ ĉio distingi kaj difini en la lingvo tri ĉefajn tipojn de signifoj:

- 1/ fonetika,
- 2/ gramatika,
- 3/ leksika.

Fonetika signifo havas tre limigitan spacon de funkciado. Ĝi validas nur por ĉiu aparta lingvosistemo kaj povas esti klasifikita kiel pure lingvistika signifo.

Gramatika signifo ne povas jam esti karakterizata de pure lingvistika vidpunkto. Kvankam la gramatika signifo ankaŭ estas apartaĵo de konkreta lingva sistemo kaj en alia lingva sistemo povas aŭ tute manki /ekz. aspekto de verbo, artikolo/ aŭ havi tute alian formon, tamen kiel semasiologia kategorio ĝi ricevas ĝeneraligon por diversaj lingvaj sistemoj tra sia rilato al la logiko. Do jam la gramatika signifo elkondukas la semasiologion el la fermita sfero de la lingvo. Des pli

Leksika signifo, restante lingvistika kategorio, kiu obeas gramatikajn leĝojn - sekve ankaŭ rilatanta al la logika ordo, rilatigas nin jam kun tute eksterlingva realo - la signata objekto. Kaj al tiu ĉi rilato altrudiĝas la plej diversaj aspektoj de la homa ekzistado: logiko, emocioj, historia evoluo, kulturaj kaj sociologiaj faktoroj ktp. Ĉiuj ili efikas la leksikan signifon de vorto. Kiel signo la vorto rilatas al la realo ankaŭ en diversa maniero: ĝi povas signi, indiki, nomi, esprimi objekton. Ĉio ĉi prezentas malfacilaĵojn por esplorado de la leksika signifo. Tial ĉiuj ĉefaj problemoj de la semasiologio estas koncentritaj ĝuste ĉirkaŭ la leksika signifo de vorto.

Se ni analizus la leksikan signifon de vorto, ni malkovrus tri ĉefajn direktojn de ĝiaj rilatoj. Antaŭ ĉio la signifo rilatigas vorton al objekto de ĝi signata. Se ni diras "tablo", "arbo", "homo", "aŭtuno", "atento", "fotono" ktp., en nia menso tuj estiĝas imagoj de la objektoj de la reala mondo, signataj de la vortoj. La vortoj mem, ilia sona kaj vida aspekto apartenas al konkreta lingvo, sed la imagoj, ideoj vekataj de ili en la homa menso estas universalaj. Ili estas komunaj kaj por franco, kaj por ruso, kaj por japano ktp., kvankam en ĉiu aparta homa menso ili diferencas laŭ konkreta prezentiĝo depende de persona sperto de ĉiu homo. En tiu ĉi okazo ni povas paroli pri rilato de vortsignifo al universalaj logikaj kategorioj - nocioj. Tamen signifo de vorto kaj de nocio plene koincidas nur en ekstrema okazo de scienca termino, kiu propre estas nomo por certa scienca nocio. Multe pli komplika estas la rilato inter nocioj kaj signifoj de komunaj vortoj. Kutime pro aparta evoluo kaj internaj lingvaj ligeblecoj de vorto ĝi havas plurajn signifojn, kaj ĉiu aparta signifo ne koincidas kun nocio. Ĝi povas kovri ĝin parte, kaj plue tuŝi aliajn nociojn, aŭ eĉ kovri per si kelkajn

nociojn ktp. Tiu ĉi sistemo de ligeblecoj kune kun etimologiaj apartaĵoj de vorto formas ĝian lingvistikan direkton de rilatoj. Ĝuste lige kun tiu ĉi aspekto de signifo ekestas la semantikaj problemoj listigitaj supre. Tiun apartaĵon de vorto, t.e. ĝian propre lingvistikan aspekton oni foje nomas "interna formo" de vorto. Ĉe tio konturiĝas la tasko por la studado de la t.n. semantikaj kampoj.

Oni devas distingi signifon de vorto kaj ĝian uzadon. Kiel ni jam notis, la subjektiva kompreno de vorto depende de persona sperto estas nedisigebla parto de la signifo. De tiu ĉi pli aŭ malpli subjektiva kompreno de vorto dependas ĝia uzado. En ĉiu aparta ago de ĝia uzado manifestiĝas la konkreta leksika signifo de la vorto. Kaj la ĝenerala leksika signifo de vorto reale ekzistas nur en tiuj konkretaj leksikaj signifoj de la vortoj, same kiel ne ekzistas tablo ĝenerale, sed ekzistas miloj kaj milionoj da konkretaj tabloj.

Prezento de vorto sub konkretaj leksikaj signifoj laŭ la scienca skemo estas unu el la malplej ellaboritaj elementoj de la semantiko. Ni renkontas ĉi tie kutime nur subjektivajn opiniojn de aŭtoroj.

Krom pri la tri ĉefaj tipoj de lingvistikaj signifoj, oni povas paroli pri esprimstilaĵoj, emocionaj kaj eble aliaj tipoj de signifoj. Tamen tiuj ĉi estas, same kiel la fonetika signifo, apartenaĵo de aparta lingva sistemo, kaj, diference de la gramatikaj kaj leksikaj signifoj, ne estas tradukeblaj en alian lingvon, sed nur redoneblaj per la specifaj rimedoj de tiu ĉi lingvo.

Antaŭ ol priparoli la semantikajn leĝojn - ĉu ili ekzistas - ni volas memorigi, ke, kiel precize difinis la sovetia filozofo P. Kopnin, "Lingvo estas ekzistadoformo de scio per sistemo de signoj"^{2/}, tute sama kiaj aliaj similaj sistemoj: vojaj signoj, mara signalaro per flagetoj ktp. La evoluo de ĉiu signa sistemo dependas de necesoj kaj evoluo de la sfero, kiun ĝi priservas. Ĉiuj ĉi sistemoj estas konvenciaj kaj povas esti ŝanĝataj laŭ bontrovo. Oni povas eĉ tute ŝanĝi la materion de signoj de tia sistemo. Ekzemple: anstataŭi la marajn flagetojn per koloraj lampoj. La fakto, ke la samajn ideojn oni povas esprimi en diversaj lingvoj atestas pri konvencieco ankaŭ de la lingvo. Ĉu oni povas ŝanĝi lingvon laŭ bontrovo aŭ tute anstataŭi lingvan materion? El ĉio dirita konkludiĝas jesa respondo al la demando. De tempo al tempo oni dekrete laŭ bontrovo ŝanĝis la norvegan lingvon k.a. Por ĉiu esperantisto estas klare, ke se oni anstataŭus la multlingvecon per unu sola lingvo, la funkciado de la homa socio, kiun priservas lingvo, gajnus nur avantaĝojn.

Tamen, se ni ŝlosus nin en unu aparta sistemo de signoj - ekz. de voĵaj signoj - ni jam ne raftas ŝanĝi en ĝi ion arbitre, sed nur konforme al la jam ekzistantaj en ĝi interŝanĝi signifojn de signoj. Sed aldoni novan signon aŭ ellasi iun el jam ekzistantaj signifus eliron el la sfero de tiu ĉi aparta sistemo de sistemo de signoj.

Absolute same statas la afero en la sistemo de signoj de homa lingvo. Nur promultjarcenta historia evoluo en ĉiu aparta sistemo de lingvo okazis tiaj ŝanĝoj - ĉu altruditaj de eksteraj fortoj, ĉu pro internaj interrilatoj de lingvaj elementoj, kiuj kultivis tute apartan lingvistikan medion, kiu fine difinas la pluan evoluon de la lingvo.

En tiu ĉi aparta lingvistika medio oni povas eltrovi proprajn leĝojn kaj leĝkonformojn, inkluzive la semantikajn. Kiel ni diris, ekzistas la ĝenerala semantiko - parto de semiotiko, kaj la lingvistika - apartenaĵo de ĉiu aparta lingvo. Tial oni povas paroli ankaŭ pri ĝeneralaj semantikaj leĝoj kaj pri semantikaj leĝoj de aparta lingvo. Ni opinias, ke ekster ĉia dubo tiaj leĝoj kaj leĝkonformoj ekzistas. Sed ĉe la nuna stadio de evoluo de la semantiko ili estas ankoraŭ trovotaj. Nuntempe ekzistas nur sporadaj opinioj kaj hipotezoj de apartaj aŭtoroj. Sed - laŭ nia opinio - neniu el ili estas ankoraŭ certa kaj pruvita por indi mension en revua artikolo.

Bibliografio

- 1/ Blake F.R. "The Study of Language from the Semantic Point of View", en "Indogermanische Forschungen", 56, 1938, p. 242.
- 2/ Kopnin P.V. "Analiz jazyka kak logiko-epistemologičeskaja problema" - prelego ĉe la XIV Internacia Filozofia Kongreso en Vieno, septembro 1968, publikigita en la revuo "Filosofskie nauki", N 5, 1968, p. 29.

SCIEBCA REVUO, Vol. 24., n-ro 2/3, pp. 101-116

MODELĀ PRONOMCO DE LA INFERLINGVO ESPERANTO

Korektoj:

ENKONDUKO, linio 4 : sia naciis

alinea b) : magneta son-bendo (kun la teksto de la lernilo), havebla ĉe la Magnetofona Servo de U.E.A. (S-ro R. Richholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado L5H 3N6) aŭ eventuale pere de landaj libro-servoj. Ofta aŭskultado (ktp.)

§ 2.8, linio 8 : lŝ-tŝ-rŝ

§ 2.9 b) linio 5 : nomm-broi
linio 6 : nomm-broin

§ 2.10 : (: bŝ-no), ... (: bŝ-lo), ... ktp

linio 15 : (: pŝ-ri-o-do)

linio 16 : (: ŝas-tass bŝ-la vŝ-tŝ-ro; ...)

§ 2.11 : Aldoni la mankantan supersignon al la vortoj, kiuj enhavas la literon ŝ

§ 3.6 : (: gŝ-ja)

§ 3.10 : (: kŝ-jo) ... (: ka-jŝ-ro)

§ 6.1 : derivitaj

§ 6.1.5 : eventualaĉo

§ 6.2 (a) : pomo-vinon

§ 6.2, linio 11 de sube : "Apfelwein"

linio 9 de sube : kongrua

§ 6.2.1.1, aldoni: balo-robo

§ 6.2.1.1, lasta linio : "dankanto"! (ne: "dan-kanto"!)

§ 6.2.1.3 : n a n - a n kaj n a' - a n

§ 6.2.1.3 : kanono-

§ 6.2.2.1 : hejme sidema

§ 6.2.2.5, aldoni: inĝenier-diplomo

§ 6.2.4.2 : elisio

Paĝo 116, linio 12 : iuj (anstataŭ: oni)

Paĝo 116, antaŭ-lasto linio, for-igi : traduko (post: traduko)